Manfred Hausmann,

Somera vespero

tradukita de Manfred Retzlaff

De l' montoj ora lumo nun
foriĝas en vespera pac'.
Ekestas trema bild' de l' lun'
sur de l' lageto la surfac'.

Kun loza kap-hararo mi
sur la teraso kuŝas nun,
kvietas mia vivo, ĝi
sin donas al la lum' de l' lun'.

Flariĝas melilot-odor',
ĝi lante supreniĝas al
la dom' dum la vespera hor',
susuras jen ros-guto-fal'.

Traduko de la Germana poemo "Sommerabend" de Manfred Hausmann *(∗1898-09-10 – †1986-08-06) en Esperanton de* Manfred Retzlaff *(∗1938-11-04) en 2014-04.*

Arg-994-2005 (2014-04-20 08:59:23)

La origina ĉina poemo troviĝas en `http://www.chinese-poems.com/m6.html`. *Pri la herbo meliloto vidu la retejon* `http://pharm1.pharmazie.uni-greifswald.de/systematik/6_droge/melilo-h.htm` *kaj* `http://www.docjones.de/wirkstoffe/steinklee/steinkleekraut-extrakt-2`.